

Conrad Ferdinand Meyer,  
Paco sur tero

*tradukita de Willy Nüesch*

La paŝtistoj en libero  
Lasis gregon, l' anĝelvorton  
Portis tra la basan pordon  
Al patrino kaj infan'.  
Plu kantadis en lontan'  
Ĉielgent' en spaco stela,  
Plu sonoris la ĉiela  
"Paco, paco sur la tero!"

Ekde tiu vort' anĝela  
Ho ve, kiom da kruela  
Faris la militkolero  
En kiras', sur rajdobest'!  
Ofte dum kristnaska fest'  
Ĥor' spirita kantis time,  
Insistpete, plendesprime:  
"Paco, paco ... sur la tero!"

Sed eternas kredregulo,  
Ke ne ĉiam la feblulo  
Iĝos pred' kaj rabkonkero  
De aroga murdogest':  
Iaspeca justo-est'  
En horor' kaj murdo rolas,  
Regno sin konstrui volas,  
Serĉas pacon sur la tero.

...

Iom post iom ĝi formos  
 Sin, oficos sankte, forĝos  
 Batalilojn sen danĝero,  
 Flamoglavojn por la rajt'.  
 Filoj kun forteco-trajt',  
 Reĝa gento ekburĝonos,  
 Kies helaj tubjoj sonos:  
 Paco, paco sur la tero.

*Traduko de la Germana poemo "Friede auf Erden" de CONRAD FERDINAND MEYER (Konrado Ferdinando Majero, \*1825-10-11 – †1898-11-28) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, \*1927-05-09).*

*Arg-101-274 (2013-08-28 18:38:58)*

*La tradukinto, s-ro Willy Nüesch (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, tel. 0041-31-302 66 56), donis al mi, Manfred Retzlaff, en 2005-07-11 la skriban permeson pri la publikigo de tiu ĉi poemo en mia retejo "www.poezio.net". La poemo enestas ankaŭ en la libro "Elektitaj poemoj de Conrad Ferdinand Meyer", kiun eldonis s-ro Willy Nüesch. Ĝi estas aĉetebla ĉe li aŭ ĉe la libro-servo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando).*